


Emile Zola



NANTAS

(1878)

Esperantigis : Mikelo (Michel Dereyger)

NANTAS - Emile ZOLA (1878)

**Mi kore dankas al ANJO, DOROTA, GINETTE kaj IVAR
pro ilia valorega helpo kaj la amikaj kuraĝigoj!**

UNUA ĈAPITRO

La ĉambro, kie loĝis Nantas ekde sia alveno el Marsejlo, troviĝis sur la lasta etaĝo de domo en la strato "rue de Lille", apud la palaceto de la barono Danvilliers, ano de la Ŝtatokonsilio.* Tiu domo apartenis al la barono, kiu konstruigis ĝin sur eksaj "komunaj" konstruaĵoj.**

Kliniĝante, Nantas povis ekvidi angulon de la ĝardeno de tiu palaceto, kie belegaj arboj ĵetis siajn ombrojn. Pli malproksime, super la verdaj arbokulminoj, libera spaco malfermiĝis sur Parizo. Videblis la breĉo de la riverego Sejno, les Tuileries***, Luvro****, la vico de la kajoj, tuta maro de tegmentoj, ĝis la fora tombejo Père-Lachaise*****. [perlaŝez]

Temis pri malgranda ĉambro kun mansardo, kies fenestro estis tranĉita en la ardeza tegmento.

Nantas estis ĝin simple meblinta per lito, tablo kaj seĝo.

Serĉinte malmultekostan loĝejon, li elektis tiun, decidis "kampoj" ĝis li trovos iun ajn postenon.

Lin ne ĉagrenis la malpurigita murpapero, la nigra plafono, la senornama kaj mizera aspekto de tiu kabineto sen kameno.

De kiam li endormiĝis fronte al Luvro kaj la palaco de Tuileries, li komparis sin kun generalo, kiu kuŝas en aĉa gastejo ĉe la rando de la strato, antaŭ la riĉa kaj grandega urbo, kiun li devos kaperi la morgaŭon.

La historio de Nantas estis mallonga.

Filo de marsejla masonisto, li komencis studi en la gimnazio de la urbego, pelita de la ambicia tenereco de sia patrino, kiu revis, ke li fariĝos "sinjoro".

La gepatroj sin oferis multe, por ke li sukcesu en sia abiturienta ekzameno.

Poste, pro la forpaso de sia patrino, Nantas devis konsenti sin dungigi ĉe negocisto. Tie dekdu jarojn li suferis vivon, kies unutoneco incitegis lin. Dekdufoje li estus fuĝinta, se lia fila devo ne tenus lin en Marsejlo, apud lia patro, kiu iam falis el skafaldo kaj kripliĝis. Nun li devis provizi ĉiujn bezonojn.

Sed iun vesperon, revenante hejmen, li trovis la masoniston mortinta, kun lia ankoraŭ varma pipo ĉe la flanko.

Post tri tagoj, li vendis la kelkajn senvalorajn aĵojn de la domo kaj forveturis al Parizo, kun ducent frankoj en la poŝo.

Estis en Nantas malcedema celado al fortune, instinkto kiun li heredis de sia patrino. Li estis junulo kun rapida decidemo kaj malvarma volo.

Kiam li estis tre juna, li diris esti "potenco". Oni ofte primokis lin, kiam li senkonscie konfidencis kaj rediris sian plej ŝatatan frazon: "Mi estas potenco", frazon, kiu iĝis ridinda, kiam oni vidis lin kun lia malpeza nigra redingoto, ŝiriĝinta ĉe la ŝultroj, kaj kies manikoj finiĝis super liaj manartikoj.

Iom post iom, la potenco fariĝis lia religio; li vidis nur ĝin en la mondo, certa ke la potenculoj tamen estas la venkintoj.

Dimanĉe, kiam li promenis sola tra la sunbruligita antaŭurbo de Marsejlo, li sentis en si genion. En la fundo de lia estaĵo troviĝis

kvazaŭ instinkta ekpuŝo, kiu ĵetis lin antaŭen.

Kaj li reiris hejmen por manĝi pladon da terpomoj kun sia kripla patro, dirante al si, ke iam li sukcesos kapti sian parton, en tiu societo, kie li ankoraŭ estis nenio jam tridekjara.

Tio ne estis malnobla inklino aŭ deziro pri vulgaraj voluptoj; tio estis la tre klara sento de komprenemo kaj de volo kiuj, estante en la maltaŭga loko, intencis trankvile supreniri al la taŭga loko pro natura bezono de logiko.

Apenaŭ li ekpaŝis sur la pavimo de Parizo, Nantas tuj kredis, ke sufiĉas etendi la manojn por trovi postenon indan je li.

Precize de iu tago, li ekserĉadis.

Celante rekomendi lin, oni jam donis al li leterojn, kiujn li portis al la ĝustaj adresoj. Krom tio, li frapis ĉe la pordoj de kelkaj samlandanoj kun la espero ricevi ilian apogon. Sed post unu monato, li akiris neniun rezulton.

La momento estis maloportuna, oni diris.

Aliloke, oni faris promesojn, kiujn oni ne plenumis.

Dume malpleniĝis lia monujo : restis nur dudeko da frankoj.

Per tiuj dudek frankoj, li devis vivteni sin tutan plian monaton, trairante Parizon de mateno ĝis vespero, kaj revenante enlitiĝi sen lumo, rompita de laciĝo, ĉiufoje kun la manoj malplenaj.

Li ne perdis kuraĝon. Tamen li eksentis obtuzan koleron. La destino ŝajnis al li mallogika kaj maljusta.

Iun vesperon, Nantas revenis hejmen, nenion manĝinte.

La antaŭan tagon li finmanĝis sian lastan panpecon.

Neniu mono plu, kaj neniu amiko, kiu pruntedonus kelkajn

groŝojn...

Pluvis la tutan tagon, unu el tiel malvarmaj kaj grizaj parizaj pluvoj.
Kvazaŭ rivero de koto fluis sur la stratoj.

Ĝisoste malsekega, Nantas jam iris
al Bercy kaj Montmartre*****, kie oni sciigis al li pri postenoj.
Sed en Bercy, la posteno estis jam okupata, kaj oni taksis lian
manskribon ne sufiĉe bela en Montmartre.

Ĉi tiuj estis liaj lastaj esperoj...

* La Ŝtatokonsilio :

[eo.wikipedia.org/wiki/%C5%9Ctatokonsilio_\(Francio\)](http://eo.wikipedia.org/wiki/%C5%9Ctatokonsilio_(Francio))

** "Komunaj" konstruaĵoj : (Fr : les communes) aldonitaj
konstruaĵoj uzitaj kiel kuirejoj, garaĝoj, ĉevalejoj, ktp., kutime por
diversaj servoj.

*** les Tuileries : eksa reĝa palaco kun ĝardeno. Tiu palaco estis
bruligita dum la Komunumo kaj malkonstruita en 1883.

**** Luvro : eo.wikipedia.org/wiki/Luvro

***** la tombejo Père-Lachaise eo.wikipedia.org/wiki/Tombejo_P%C3%A8re-Lachaise

***** Bercy : eo.wikipedia.org/wiki/Kvartalo_de_Bercy
Montmartre : eo.wikipedia.org/wiki/Montmartre

NB : la barono *Danvilliers* : prononcu [danvilje]

2.

Li estus akceptinta ajnan proponon kun la certeco, ke li ekriĉiĝos tuj per la unua posteno. Komence li demandus nur panon, sufiĉe por vivteni sin en Parizo; poste : terenon por ŝtonon post ŝtono konstruadi.

De Montmartre ĝis la strato "rue de Lille", li malrapide paŝis kun la koro dronita de amara sento.

Jam ĉesis la pluvo; sur la trotuaroj aferema homamaso puŝis lin. Kelkajn momentojn li haltis antaŭ komercejo de ŝanĝisto : eble kvin frankoj sufiĉus por iam fariĝi la majstro de l' mondo; per kvin frankoj, eblas vivteni sin tutan semajnon, kaj en unu semajno multajn aferojn oni povus fari.

Dum li tiel revis, veturilo surŝprucigis lin. Li devis viŝi sian frunton, kiun ĵus frapetis kotŝpruco. Tiam li rapidigis sian paŝon, kunpremante la dentojn; kreskis en li kruela emo ekpugnobati tiun homamason, kiu blokis la stratojn : per tio li estus venĝita kontraŭ la absurdeco de l' destino.

Sur la strato Richelieu, omnibuso preskaŭ faligis lin. Meze de la placo Carrousel, li ĵetis al la palaco Tuileries ĵaluzan rigardon. Sur la ponto de "Saints-Pères",* bele vestita knabineto devigis lin devojiĝi de la rekta vojiro, kiun li strikte laŭiris kvazaŭ apro persekutata de hundaro. Tiu devojiĝo ŝajnis al li la plej grava humiligo : malhelpis lin pasi eĉ infanoj!

Fine, kiam li rifuĝis en sian ĉambron, kiel vundita besto revenas morti en la ŝirmejon, li peze sidiĝis sur sian seĝon, konfuziĝinta, inspektante sian pantalonon, kiu rigidiĝis pro la koto, kaj siajn eluzitajn ŝuojn, kiuj lasis flakegon elflui sur la kahelaron.

Ĉifoje, ĉio finiĝis. Nantas sin demandis, kiel li mortigus sin. Lia orgojlo daŭre staris; li taksis, ke Parizon punos lia memmortigo. Esti potenco, senti en si potencon sed ne trovi iun, kiu divenas vin, kiu donas al vi la unuan eskudon**, kiun vi bezonas!... tio ŝajnis al li monstra stulteco; lia tuta estaĵo ribelis pro kolero.

Poste, estis en li grandega bedaŭro, kiam lia rigardo renkontis liajn senutilajn brakojn. Tamen, lin timigis neniu laboro; per la pinto de sia etfingro, li estus levinta la mondon, kaj li restis tie, forpelita en angulon, devigita al senpoveco, sin vorante kvazaŭ leono en kaĝo.

Sed li baldaŭ kvietiĝis; li opiniis, ke la morto estas pli nobla.

Dum lia infanaĝo, oni rakontis al li la historion pri inventisto kiu, konstruinte mirindan maŝinon, rompis ĝin per martelfrapoj, fronte al la indiferenteco de la homamaso..

Nu! Tia viro, li mem estis; li alportis en si novan forton, raran meĥanikaĵon de inteligenco kaj volo, kaj li estis detruonta tiun maŝinon per la rompiĝo de sia kranio sur la pavimento de la strato.

La suno subiris malantaŭ la arbegoj de la palaceto Danvillers, iu aŭtuna suno, kies oraj radioj lumigis la flaviĝintajn foliojn. Nantas stariĝis, kvazaŭ logita de tiu astra adiaŭo. Li estis mortonta; li bezonis lumon. Dum momento, li kliniĝis.

Ofte, tra la abundo da foliaroj ĉe la kurbo de l' aleo, li vidis alstaturan blondan fraŭlinon, kiu paŝis kun princa orgojlo. Li tute ne estis sentimentala : jam pasis tiu aĝo, kiam la junaj viroj revas en siaj mansardoj, ke mondumaj fraŭlinoj venas alporti al ili grandajn pasiojn kaj grandajn havaĵojn. Tamen okazis en tiu plej grava momento de sia tuja memmortigo, ke li subite memoris pri tiu bela juna blondulino tiom malhumila. Kiel do ŝi povus nomiĝi?

Sed samtempe li kunpremis la pugnojn, ĉar li sentis nur malamon kontraŭ la homoj de tiu palaceto, kies duonfermitaj fenestroj ebligis ekvidi angulojn de severa lukso, kaj li murmuris kun kolerega impulso:
"Ho! Mi vendos min! Mi vendos min!... Se almenaŭ oni donus al mi la unuajn cent groŝojn de mia estonta havaĵo!..."

Tiu ideo vendi sin okupis lin dum momento. Se ie ekzistus "Mont-de-Piété" ***, kie oni pruntedonus kontraŭ volo kaj energio, li mem irus tien deponi sin. Li imagis merkatojn : iu politikisto venis aĉeti lin, por ke li fariĝu lia ilo; iu bankisto prenis lin por iam ajn uzi lian inteligenton... kaj li konsentis, malestimante la honoron, dirante al si, ke sufiĉas esti forta kaj iam triumfi.

Kaj li havis rideton. Ĉu troveblas oportuno vendi sin?
La fiuloj, kiuj gvas la okazojn, mortaĉas pro mizero, neniam trovinte aĉetanton.

Li timis esti malkuraĝa; li diris al si, ke li imagas nun deflankiĝojn. Kaj li denove sidiĝis, promesante al si, ke li ĵetos sin el la fenestro kiam plene noktiĝos.

Tamen li estis tiel lacega, ke li endormiĝis sur la seĝo. Abrupte lin vekis voĉbruo.

Temis pri la pordistino, kiu enirigis virinon en lian apartamenton. "Sinjoro," ŝi komencis diri, "mi permesis al mi suprenirigi..." Kaj ekvidinte, ke la ĉambro ne estas lumigita, ŝi vigle reiris malsupren por serĉi kandelon. Samtempe servema kaj respektplena, ŝi ŝajne konis la personon, kiun ŝi venigis.

"Jen," ŝi rediris forirante, "vi povas libere paroli; neniuj ĝenos vin."

Nantas, kiu jam vekiĝis kun eksalto, mire rigardis la virinon. Ŝi levis sian vualeton. Kvardek kvin jaraĝa, ŝi estis malgranda, tre dika, kun bela vizaĝo blanka, kiel tiu de bigotino. Li neniam vidis ŝin.

Kiam li prezentis al ŝi la nuran seĝon, pridemandante ŝin per la rigardo, ŝi nomis sin:

"Fraŭlino Ŝuin... Sinjoro, mi venas paroli kun vi pri grava afero..."

.

* Pont des Saints-Pères = ponto de la Sanktaj Patroj

** Eskudo (= Fr: écu) : iama franca monero. Post la Revolucio de 1789, ĝin anstataŭis la franko (le franc), sed oni daŭre uzis la vorton "écu" ĝis la jaroj 1930 por paroli pri la arĝenta monero de 5 frankoj.

*** Mont-de-Piété = lombardejo, pruntodeponejo

(vortaro.net/#lombardejo)

3.

Li devis sidiĝi sur la litrando. Nenion elvokis al li la nomo de fraŭlino Ŝuin.

Li preferis atendi, ke ŝi mem bonvoleme ĉion klarigos. Sed ŝi ne rapidis; per unu rigardo, ŝi jam ĉirkaŭvidis la mallarĝan ĉambron kaj ŝajnis heziti kiel ŝi komencos la interparolon.

Fine, ŝi ekparolis kun tre dolĉa voĉo, reliefigante la tiklajn punktojn per rideto.

"Sinjoro, mi venas kiel amikino... Oni rakontis al mi plej kortuŝantajn aferojn pri vi. Sed tute ne kredu pri kaŝobservo. En ĉio tio ekzistas nur la vigla volo utili al vi.

Mi scias, kiom malfacila estis via vivo ĝis nun, kiom da kuraĝo vi devis uzi klopodante eltrovi postenon, kaj kia estas hodiaŭ la malplaĉa rezulto de tiom da streboj...

Refoje pardonu, sinjoro, ke mi enmiksiĝas tiel en vian privatan vivon. Mi promesas al vi, ke nur simpatio ... "

Nantas ne interrompis ŝin; li fariĝis pli scivola, opiniante ke la pordistino verŝajne rivelis al ŝi tiujn detalojn. Fraŭlino Ŝuin povis plue paroli, tamen ŝi pli kaj pli serĉis laŭdajn kaj karesajn manierojn por diri la aferojn.

"Vi estas viro kun granda estonteco, sinjoro. Mi permesis al mi observi viajn provojn, kaj mi estis vere impresita de via admirinda firmeco malgraŭ via malfeliĉo. Fine, ŝajnas al mi, ke vi multe sukcesus, se iu donus al vi helpan manon."

Ŝi denove haltis. Ŝi atendis iun vorton.

La juna viro kredis, ke tiu virino venas proponi al li postenon. Li respondis, ke li akceptos ion ajn.

Sed nun, kiam estis disrompita la glacio, ŝi abrupte demandis lin:

"Ĉu malplaĉus al vi edziĝi?"

"Ĉu edziĝi?" Nantas ekkriis. "Nu, je Dio! Kiu bonvolus akcepti min, sinjorino?... Iu malriĉa fraŭlino, kiun mi eĉ ne povus nutri?!"

"Ne! Fraŭlino tre bela, tre riĉa, de bonege parenციĝinta familio, kaj kiu tuj enmanigos al vi la rimedojn por trafi la plej altan postenon."

Nantas ne plu ridis.

"Nu, pri kiu merkato temas? " li demandis, instinkte mallaŭtigante la voĉon.

"Tiu fraŭlino estas graveda, kaj necesas, ke vi akceptu la infanon kiel vian" nete diris fraŭlino Ŝuin, kiu forgesis siajn mildajn dirmanierojn por pli rapidigi sian aferon.

La unua reago de Nantas estis elĵeti tiun svatanton* el la domo.

"Jen malgloriga propono!" li murmuris.

"Ho! Ĉu malgloriga?!" ekkriis fraŭlino Ŝuin, retrovinte sian mielan voĉon. "Mi ne konsentas pri tiu aĉa vorto... La vero, sinjoro, estas, ke vi savos familion de la malespero. La patro nenion scias; la gravedeco estas ankoraŭ freŝdata, kaj mi mem pripensis tiun aranĝon: edzinigi la kompatindan knabinon kiel eble plej baldaŭ kaj prezenti la edzon, kiel la patron de l'infano...

Mi bone konas ŝian patron; li mortus pro tio... Mia aranĝo mildigos la baton; li opinios pri riparo de la peko.

Estas malfeliĉe, ke la vera deloginto estas mem edziĝinta. Ho! Sinjoro! Estas viroj, al kiuj tute mankas la morala sento."

Ŝi povintus longe paroli tiel. Nantas ne plu aŭskultis ŝin.

Kial do li malkonsentus? Li ĵus intencis vendi sin, ĉu ne?

Nu, oni venis aĉeti lin.

Tiom ŝi al li, tiom li al ŝi!

Li donos sian nomon, oni donos al li oportunon. Temis pri kontrakto kiel iu ajn alia.

Li rigardis sian pantalonon makulitan de Pariza koto; li sentis, ke li ne manĝis de la hieraŭo; en lian koron revenis la tuta kolero de la dumonataj serĉoj kaj humiliĝoj.

Finfine! Li baldaŭ ekpaŝos en tiun mondon, kiu forpelis lin kaj ĵetis lin al memmortigo.

Li krude diris:

"Mi konsentas."

Kaj li postulis precizajn klarigojn de fraŭlino Ŝuin.

Kiom ŝi deziras por sia perado?

Ŝi protestis; ŝi deziris nenion.

Tamen, ŝi fine petis dudek mil frankojn de la monsumo, kiun ricevos la juna viro.

Ĉar li ne marĉandis, ŝi montris sin komunikema.

"Aŭskultu, mi mem pensis pri vi. La juna fraŭlino ne rifuzis, kiam mi menciis vian nomon.

Ho! Temas pri bona afero! Iam poste vi dankos min!

Mi povintus trovi noblan viron; iun mi konas, kiu kisas miajn manojn. Sed mi preferis elekti ekster la mondumo de tiu kompatinda infano. Tio ŝajnos pli romaneca... Kaj vi plaĉas al mi; vi estas amika... Vi havas solidan spiriton! Ho! Vi bonege sukcesos! Ne forgesu min; mi estas tute je via servo."

Ĝis tiam, ŝi diris neniun nomon. Je la demando de Nantas, la maljuna fraŭlino stariĝis kaj refoje prezentis sin dirante:

"Fraŭlino Ŝuin. Mi estas guvernistino ĉe la barono Danvilliers ekde la forpaso de la baronino. Mi mem edukis fraŭlinon Flavian, la filinon de la barono... Fraŭlino Flavia estas la persono, pri kiu temas."

Kaj ŝi foriris, diskrete metinte sur la tablon koverton, kiu enhavis banknoton da kvincent frankoj. Tio estis antaŭpago, kiun ŝi mem donis, por kovri la unuajn elspezojn.

Kiam li estis sola, Nantas iris stari ĉe la fenestro. La nokto estis tre obskura. Oni distingis nur la mason de la arboj pro la denseco de l' ombro. Brilis unu fenestro sur la malhela fasado de la palaceto.

Tiel temis pri tiu granda blondulino, kiu iris kun reĝinaj paŝoj, kaj ne degnis rigardi lin. Se temis pri ŝi aŭ aliulino, tio ne gravis, fakte! Ne la juna virino mem partoprenis la kontrakton.

Tiam, Nantas levis la okulojn pli alten: al Parizo, kiu grumblis en la tenebro; al la kajoj, la stratoj, la vojkruciĝoj de la maldekstra riverbordo lumigitaj per la dancantaj flamoj de la lungaso...

Li fariĝis familiara kaj supera, kaj li ciumis Parizon :
"Nun, ci estas mia!"

* *svatanto / svati* : vortaro.net/#svati

4.

DUA ĈAPITRO

La barono Danvilliers troviĝis en la salono, kiun li uzis kiel oficejon : rigora, alta ĉambro tegita per ledo kaj ornamita per antikvaj mebloj.

De la antaŭhieraŭo, li daŭre estis kvazaŭ fulmofrapita de la historio, kiun rakontis fraŭlino Ŝuin, pri la malhonoro de Flavia.

Kiam ajn supraĵe ŝi provis prezenti la faktojn kaj mildigi ilin, la bato suferigis la maljunulon, kaj nur la penso, ke la deloginto povos proponi superan riparon de la peko, ebligis al li plu stari.

Tiun matenon, li atendis la viziton de tiu viro, kiun li tute ne konas, kaj kiu tiel fie prenis lian filinon.
Li sonorigis.

"Jozefo, baldaŭ alvenos juna viro, kiun vi enirigos. Por neniu ajn mi ĉeestos."

Kaj li amare pripensis, sola ĉe la angulo de sia kameno :
"La filo de masonisto; iu mizerulo, kiu eĉ ne havas honoran situacion!"

Fraŭlino Ŝuin prezentis lin kiel fraŭlon kun brila estonteco... sed kioma honto en familio, kiun neniu iam misfamigis!

Flavia kolereme sin akuzis por eviti al sia guvernistino la plej etan riproĉon. Depost tiu malfacila klarigo, ŝi restis en sia dormoĉambro, kaj la barono rifuzis revidi ŝin.

Antaŭ ĉio li volis mem prizorgi tiun abomenindan aferon.
Ĉiujn siajn decidojn li jam faris.
Sed liaj haroj fine tute blankiĝis, kaj lian kapon svingetis nun senila tremeto.

"Sinjoro Nantas!" anoncis Jozefo.

La barono ne stariĝis. Li nur turnis la kapon kaj fikse rigardis Nantas-on, kiu proksimiĝis. Tiu ĉi saĝe ne cedis al sia emo tutnove vestiĝi. Li aĉetis redingoton kaj nigran pantalonon ankoraŭ purajn sed tre eluzitajn, kaj li aspektis kiel studento malriĉa kaj zorgema sed tute ne aventurema.

Li haltis en la mezo de la ĉambro kaj atendis, staranta sen humileco.

"Do, estas vi, sinjoro!" balbutis la oldulo. Sed li ne povis daŭrigi, ĉar emocio sufokis lin. Li timis cedi al iu perforto.

Post silento, li simple diris:
"Sinjoro, vi faris ja malbonan agon..."

Kaj, ĉar Nantas estis petonta pardonon, li rediris kun plia forto:
"Malbonan agon... Nenion mi deziras ekscii. Mi petas, ke vi ne serĉu klarigi la aferojn. Se mia filino ĵetus sin sur vian kolon, via krimo estus la sama. Nur la ŝtelistoj tiel perforte enŝoviĝas en familiojn."

Nantas refoje klinis la kapon.

"Estas doto facile gajnita! Temas pri embusko, per kio vi certis kapti kaj la filinon kaj la patron!"
"Permesu, sinjoro..." interrompis la junulo, kiu ekribelis.

Sed la barono kolerege gestis:
"Kion? Kion vi volas, ke mi permesu? ... Ne VI devas paroli ĉi tie! Mi diras al vi tion, kion mi devas diri, kaj kion vi devas aŭdi, ĉar vi venas al mi kiel kulpulo... Min vi atencis! ... Vidu tiun ĉi domon! Nia familio vivis ĉi tie tri jarcentojn sen ia makulo! Ĉu vi ne sentas jarcentan honoron, tradicion de digneco kaj respekto? Nu, sinjoro, vi insultis ĉion tion!... Mi preskaŭ mortis pro tio, kaj hodiaŭ miaj manoj tremetas kvazaŭ mi subite maljuniĝis je dek jaroj... Silentu! Kaj aŭskultu min!"

Nantas forte paliĝis. Ja tre pezan rolon li konsentis ludi. Tamen, li deziris preteksti, ke lin blindigis la pasio.
"Mi perdis la memregon" li murmuris, provante elpensi romanon.
"Mi ne povis vidi fraŭlinon Flavian..."

Aŭdinte la nomon de sia filino, la barono stariĝis kaj ekkriis per tondra voĉo :

"Silentu! Mi jam diris al vi, ke nenion mi volas ekscii. Ĉu mia filino iris renkontiĝi kun vi, aŭ ĉu vi mem venis al ŝi, tio ne estas mia afero!... Nenion mi demandis al ŝi. Ambaŭ konservu viajn konfesojn; jen aĉaĵo, kiu ne koncernas min!"

Li ree sidiĝis, tremanta, elĉerpita.

Nantas kliniĝis, profunde konfuzita malgraŭ sia memrego.

Post momento da silento, la maljunulo rediris per tiu seka voĉo de homo, kiu traktas iun aferon :

"Mi petas vian pardonon, sinjoro. Mi promesis al mi konservi la memregon. Ne vi apartenas al mi, sed mi apartenas al vi, ĉar mi devas lasi ĉion al via bontrovo. Vi estas ĉi tie por proponi al mi aranĝon, kiu fariĝis necesa. Ni faru kompromison, sinjoro."

Kaj de tiam, li ŝajnis paroli kiel advokato, kiu amike aranĝas iun hontindan proceson, en kiun li metas la manojn kun naŭzo.

Li kviete diris :

"Fraŭlino Flavia Devilliers, post la morto de sia patrino, heredis la sumon de ducent mil frankojn, kiun ŝi ricevos nur la tagon de sia edziniĝo. Tiu sumo jam produktis interezojn. Fakte, jen miaj kontoj de kuratoro, kiujn mi volis sciigi al vi."

Li jam malfermis dosieron kaj legis nombrojn.

Nantas vane provis lin halti. Li emoĉiiĝis nun fronte al tiu maljunulo tiel honesta kaj tiel simpla, kiu aspektis pli altstatura de kiam li kvietiĝis.

"Fine" li konkludis, " en la kontrakto, kiun mia notario skribis ĉi-matene, mi konsentas al vi antaŭpagon de ducent mil frankoj... Mi scias, ke vi posedas nenion... Vi ricevos tiujn ducent mil frankojn ĉe mia bankisto la morgaŭon de la geedziĝo."

"Sed, sinjoro" diris Nantas, "mi ne postulas vian monon; nur vian filinon mi volas...."

La barono interrompis lin:

"Vi ne rajtas rifuzi, ĉar mia filino ne povus edziniĝi kun viro malpli

riĉa ol ŝi... Mi donos al vi la doton, kiun mi destinis al ŝi, jen ĉio... Eble vi esperis trovi pli multe, sed oni kredas min pli riĉa ol la realo, sinjoro."

Kaj, ĉar la junulo daŭre silentis pro tiu ĉi lasta kruelaĵo, la barono finis la interparoladon kaj sonorigis al la servisto :

"Jozefo! Diru al la fraŭlino, ke mi tuj atendas ŝin en mia oficejo."

Li jam stariĝis, ne plu diris eĉ unu vorton kaj paŝis malrapide.

Nantas restis staranta kaj senmova. Li perfidis tiun maljunulon kaj li sentis sin malgranda kaj senforta antaŭ li.

Finfine eniris Flavia.

5.

"Filino mia" diris la barono, "jen tiu viro. La geedziĝo okazos laŭleĝa tempolimo."

Kaj li eliris, lasante ilin solaj, kvazaŭ por li jam okazus la geedziĝo. Kiam fermiĝis la pordo, regis silento.

Nantas kaj Flavia rigardis unu la alian. Ili ankoraŭ ne renkontiĝis. Al li, ŝi aspektis tre bela kun sia pala kaj malhumila vizaĝo, kies grandaj grizaj okuloj ne malleviĝis. Ŝi eble ploris dum tiuj tri tagoj, kiam ŝi ne forlasis sian ĉambron, sed la malvarmeco de ŝiaj vangoj verŝajne jam frostigis la larmojn.

Ŝi unue ekparolis :

"Nu, sinjoro, ĉu tiu afero finiĝis?"

"Jes, sinjorino." simple respondis Nantas.

Ŝi nevole paŭtis, longe observis lin per rigardo, kiu ŝajne serĉis en li fiecon.

"Nu, despli bone." ŝi plu diris. "Mi timis trovi neniun por tia kontrakto."

Nantas sentis en ŝia voĉo la tutan malestimon, per kiu ŝi korpremis lin.

Sed li relevis la kapon.

Se li tremis fronte al la patro, sciante, ke li trompŝtelas lin, li intencis resti forta kaj senartifika fronte al la filino, kiu estas lia komplico.

"Pardonon, sinjorino!" li kviete kaj tre afable diris. "Mi opinias, ke vi eraras pri la situacio, kiu okazigas al ni tion, kion vi tre ĝuste nomas kontrakto. Mi deziras, ke de hodiaŭ ni rigardu unu la alian kiel egalaj ... "

"Ĉu vere?" interrompis Flavia kun malestima rideto.

"Sed kiel veraj samranguloj... Vi bezonas nomon por kaŝi pekon, kiun mi ne permesas al mi juĝi, kaj tiun nomon mi donas al vi. Miaflanke, mi bezonas investadon kaj socian situacion por realigi grandajn aferojn, kaj tiun investadon vi alportas al mi. De hodiaŭ ni ambaŭ estas partneroj, kies alportoj kompensiĝas. Ni bezonas nur

danki unu la alian por la servo, kiun ni reciproke plenumas."

Ŝi ĉesis rideti. Orgojla faldo baris ŝian frunton. Tamen ŝi ne respondis.

Post silento ŝi plu diris:

"Ĉu vi konas miajn kondiĉojn?"

"Ne, sinjorino" respondis Nantas, kiu perfekte regis sin. "Bonvolu dikti ilin, kaj mi anticipe submetas min."

Tiam ŝi nete esprimis sin, sen hezito nek ruĝiĝo :

"Nur per la nomo vi estos mia edzo. Niaj vivoj daŭre estos tute disaj kaj apartigitaj. Vi rezignos ĉiujn viajn rajtojn pri mi, kaj neniun devon mi havos por vi."

Je ĉiu frazo, Nantas kapjese konsentis.

Tio estis ja, kion li deziris.

Li aldonis :

"Se mi opinius devi galanti, mi dirus, ke tiel malfacilaj kondiĉoj senesperigas min. Sed ni troviĝas for de tiaj banalaj ĝentilaĵoj. Min ĝojigas via kuraĝo rilate al niaj respektivaj situacioj. Ni eniros la vivon per vojo, kie oni ne plukas florojn.

Nur unu aferon mi postulas, sinjorino : ne ĝuu la liberecon, kiun mi lasos al vi, tiel ke ĝi necesus mian intervenon..."

"Sinjoro!" violente ekkriis Flavia, kies orgojlo ribelis.

Sed li respekte kliniĝis, petegante, ke ŝi ne sentu sin ofendita.

Ilia situacio estis delikata. Ambaŭ devis toleri iujn aludojn, sen kiuj maleblus bona interkonsento.

Li ne volis insisti.

Dum alia interparolado, Fraŭlino Ŝuin jam rakontis al li pri la peko de Flavia. Ŝia deloginto estis iu sinjoro *Des Fondettes**, la edzo de unu el ŝiaj amikinoj, kiuj kunlernis kun ŝi en monaĥinejo. Kiam ŝi pasigis unu monaton ĉe ili, en la kamparo, iun vesperon ŝi troviĝis en la brakoj de tiu viro, sen ĝuste scii kiel tio povus okazi kaj kiom konsenta ŝi estis. Fraŭlino Ŝuin preskaŭ parolis pri seksperforto.

Subite Nantas havis amikan geston.

Kiel ĉiuj viroj konsciaj pri sia forto, li ŝatis montri sin bonkora

homo.

"Nu, sinjorino!" li ekkriis, "ni ne konas unu la alian. Sed ni vere malpravus malami unu la alian je la unua vido. Ni eble estas destinitaj por bone akordiĝi. Mi ja vidas, ke vi malestimas min; tiel estas ĉar vi ne konas mian historion..."

Kaj li febre parolis, fariĝis pasia, rakontis sian ambiciplenan vivon en Marsejlo; li klarigis sian koleregon pro du senfruktaj monatoj en Parizo.

Kaj li montris sian malestimon por tio, kiun li nomis la sociaj konvencioj, kie vagadas la plejmulto de la homoj.

Tute egale la opinio de la homamaso, kiam oni surtretas ĝin ! Gravis esti supera. Ĉion pravigis la plena potenco. Kaj li skize priskribis la suverenan vivon, kiun li povos fari al si. Neniun obstaklon li timis : nenio superis la potencon. Li estos potenca, li estos feliĉa.

"Ne kredu, ke mi estas banale profitema!" li aldonis. "Mi ne vendas min por via havaĵo. Vian monon mi prenas nur kiel rimedon por tre alte atingi. Ho! Se vi scius ĉion, kiu murmuregas en mi! Se vi scius pri la pasiaj noktoj, kiujn mi pasigis senfine farante la saman sonĝon senĉese forprenitan de la morgaŭa realeco, vi komprenus min, vi eble estus fiera apogi vin je mia brako; vi dirus al vi, ke vi finfine donas al mi la rimedon, por ke mi fariĝu gravulo."

Ŝi aŭskultis lin rekte starante; neniun trajto de ŝia vizaĝo moviĝis. De tri tagoj li faris al si la demandon sen trovi ties respondon : ĉu ŝi rimarkis lin ĉe lia fenestro por tiel rapide konsenti pri la plano de fraŭlino Ŝuin, kiam tiu ĉi proponis lian nomon?

Venis al li neordinara penso, ke ŝi eble ekamus lin per sentimentala korinklino se li estus indigne rifuzinta la kontrakton, kiun la guvernistino venis proponi al li.

Li silentis dum Flavia daŭre montris sin glacia.

Poste, kvazaŭ li ne estus sin konfesinta, ŝi sekte rediris: "Nu tiel : mia edzo nur por la nomo; niaj vivoj tute apartaj; plena libereco."

Nantas tuj reprenis sian ceremonian mienon kaj sian sekan voĉon de homo, kiu pridiskutas kontrakton :
"Tio estas subskribita, sinjorino."

Kaj li eliris, malkontenta pri si.

Kial do li cedis al la stulta emo konvinki tiun virinon?...
Ŝi estis tre bela; pli bone estis, ke nenio komuna ekzistus inter ili,
ĉar ŝi povus lin ĝeni en lia vivo.

* *sinjoro De Fondettes* : prononcu [de fondet']

6.

TRIA ĈAPITRO

Pasis dek jaroj...

Iun matenon, Nantas troviĝis en la oficejo, kie la barono Danvilliers iam akceptis lin tiel krude dum ilia unua interparolo.

Tiu oficejo estis nun lia; post repaciĝo kun siaj filino kaj bofilo, la barono lasis al ili la palaceton, konservante nur domon aliflanke de la ĝardeno, kiu rigardis al la strato *rue de Beaune*. [bon']

Post dek jaroj, Nantas ĵus konkeris unu el la plej altaj financaj kaj industriaj situacioj. Partoprenante en ĉiuj grandaj fervojaj societoj, enmiksita en ĉiujn spekuladojn pri la terenoj, kiuj markis la unuajn jarojn de la imperio, li rapide gajnis grandegan havaĵon.

Sed lia ambicio ne haltis tie : dezirante ludi politikan rolon, li sukcesis fariĝi deputito en departemento, kie li posedis plurajn farmbienojn.

Tuj kiam li eniris la Nacian Asembleon, li agis kvazaŭ estonta ministro pri financoj.

Per siaj specifaj scioj kaj facileco por paroladoj, tagon post tago li atingis tie pli gravan postenon.

Fakte, li lerte montris totalan dediĉon al la imperio kaj samtempe havis siajn proprajn teoriojn pri financoj. Oni multe klaĉis pri tiuj, kaj li sciis, ke ili vere maltrankviligis la imperiestron.

Tiun matenon, Nantas estis ege okupata.

En la vastaj oficejoj, kiujn li estis aranĝinta sur la teretaĝo de la palaceto, regis fortega aktiveco. Tie estis mondo de oficistoj, iuj senmovaj malantaŭ giĉetoj, dum aliaj senĉese iris tien kaj reen kun pordobruoj.

Aŭdiĝis la senfina sono de oro fluanta el malfermitaj sakoj sur la tablojn, kaj la muziko de daŭre sonantaj kaso, kies monfluo ŝajne estis inundonta la stratojn.

Kaj en la antaŭĉambro sin pelis homamaso : advokatoj, aferistoj,

politikistoj, multaj el la Pariza mondomo, kiuj genuiĝis antaŭ la potenco.

Ofte, gravuloj pacience atendis tie dum horo.

Dume, sidante ĉe sia skribtablo, korespondante kun la provinco kaj eksterlandoj, per siaj etenditaj brakoj li povis brakumi la mondon : sian malnovan revon pri potenco li finfine realigis. Li sentis sin, kvazaŭ li estus la inteligenta motoro de giganta maŝino, kiu movetus la reĝlandojn kaj imperiestrojn.

Nantas sonorigis al la akceptisto, kiu gardis lian pordon. Li aspektis malkvieta.

"Ĝermeno !" li demandis, "eble vi scias, ĉu la sinjorino revenis hejmen?"

La akceptisto, kiu respondis, ke li ne scias, Nantas petis, ke li malsupren venigu la ĉambristinon de la sinjorino. Sed Ĝermeno ne eliris.

"Bonvolu pardoni, sinjoro!" li murmuris. "Ĉi tie atendas sinjoro prezidanto de la Nacia Asembleo, kiu insistas por eniri."

Tiam li humore gestis kaj diris:

"Nu, enirigu lin kaj faru, kion mi ordonis al vi!"

La antaŭtagon, koncerne gravegan demandon pri la buĝeto, la parolado de Nantas kaŭzis tian impreson, ke la diskutitan artikolon oni sendis al la komisiono por ricevi amendon laŭ lia opinio.

Post la kunsido disvastiĝis rumoro, laŭ kiu la ministro pri financoj estas demisionanta, kaj en la grupoj oni jam elektis la junan deputiton kiel lian posteulon.

Li mem levis la ŝultrojn : ankoraŭ nenio estis decidita; fakte, li interparolis kun la imperiestro nur pri kelkaj specifaj punktoj. Tamen el la vizito de l' prezidanto de la Nacia Asembleo povus rezulti io gravega.

Li ŝajnis forĵeti la zorgon, kiu ĉagrenis lin. Stariĝinte, li iris manpremi kun la prezidanto.

"Ha! Sinjoro duko!" li diris, "mi petas vian pardonon. Mi ne sciis, ke vi troviĝas ĉi tie... Bonvolu kredi, ke tre kortuŝas min la honoro,

kiun vi faras al mi."

Dum momento, ili senpripense kaj korece interparolis. Poste la prezidanto, sen diri ion precizan, subkomprenigis, ke la imperiestro komisiigis lin por prova esploro. Ĉu li konsentus fariĝi ministro pri financo, kaj kun kia programo?

Tiam li, kun admirinda memrego, metis siajn kondiĉojn. Sed sub lia ŝajne senesprima vizaĝo, venis triumfa grumblo : finfine li supreniris la lastan ŝtupon, li atingis la pinton! Necesis nur unu plia paŝo, kaj li troviĝos super ĉiuj kapoj!

Dum la prezidanto konkludis dirante, ke li tuj renkontos la imperiestron por informi lin pri la diskutita programo, malfermiĝis pordeto rigardanta al la apartamentoj, kaj eniris la ĉambristino de la sinjorino.

Nantas subite ree paliĝis, ne finis la frazon, kiun li estis diranta. Li rapidis al la virino kaj murmuris:
"Bonvolu pardoni, sinjoro duko..."

Kaj li mallaŭte pridemandis ŝin. Ĉu la sinjorino eliris frue? Kiam ŝi revenos hejmen?

La ĉambristino respondis per svagaj paroloj, kiel saĝa fraŭlino, kiu ne volas kompromitiĝi.

Kompreninte la naivecon de tiu pridemando, li fine simple diris:
"Ekde kiam la sinjorino estos hejme, informu ŝin, ke mi deziras paroli kun ŝi."

La duko, surprizita, estis proksimiĝinta al fenestro kaj rigardis la korton.

Nantas revenis al li, denove petante pardonon. Sed li estis perdinta sian memregon. Li balbutis, li mirigis lin per siaj mallertaj paroloj.

"Nu, mi fuŝis mian aferon!" li laŭte eligis kiam la prezidanto estis elirinta. "Jen ministerio, kiun mi ŝajne ellasis!"

Kaj li restis kun ĝena sento interrompita de intermita kolero.

Pluraj personoj estis jam enirigitaj. Inĝeniero devis prezenti raporton, kiu anoncis gigantajn profitojn en minejo. Diplomato informis lin pri prunto, kiun najbara potenco deziris fari en Parizo.

Pasis kreaĵoj, kiuj donis komunikaĵojn pri dudeko da gravegaj aferoj.

Fine, li akceptis multajn el siaj kolegoj de l' Asembleo.
Ĉiuj faris troajn laŭdojn pri lia antaŭtaga parolado.

Li mem, sidante en la fundo de sia fotelo, ricevis tiun tutan incensadon sen eĉ iu rideto.

7.

Daŭre bruis oro en la apudaj oficejoj, tremado de uzino skuetis la murojn, kvazaŭ tie oni fabrikus tiun tutan sonorantan oron. Sufiĉus, ke li ekprenus nur plumon por sendi leterojn, kies alveno ĝojigus aŭ konsternus la Eŭropajn merkatojn. Li povis malhelpi aŭ akceli la militon, apogante aŭ kontraŭbatalante prunton, pri kiu oni parolis al li.

Eĉ la Franca buĝeto troviĝis en liaj manoj, kaj baldaŭ li scios, ĉu subteni la imperion aŭ ne.

Tio estis lia triumfo; lia tro forta personeco fariĝis la centro, ĉirkaŭ kiu turniĝis mondo. Sed li ne ĝuis tiun triumfon, kiel li iam promesis al si. Li sentis lacecon kaj distriĝis; li ekstremis je la plej eta bruo.

Kiam flamo, febro de kontenta ambicio suprenvenis sur liajn vangojn, li tuj sentis sin paliĝi kvazaŭ subite, el malantaŭe, malvarma mano tuŝetus lian nukon.

Jam pasis du horoj kaj Flavia ankoraŭ ne aperis.

Nantas vokis Ĝermanon, ke li venigu sinjoron Danvilliers, se la barono ĉeestas en sia domo.

Restante sola, li paŝis en sia oficejo kaj rifuzis plu akcepti iun tiutage.

Iom post iom kreskis lia malkvieto.

Kompreneble, lia edzino ĉeestis ian rendevuon! Ŝi verŝajne rekomencis renkonti sinjoron De Fondettes, kiu vidviĝis de ses monatoj.

Fakte, Nantas neis esti ĵaluza : dum dek jaroj, li strikte plenumis la konsentitan kontrakton.

Tamen li deziris ne aspekti ridinda. Li neniam permesus, ke lia edzino minacus lian situacion, kaj igus lin mokinda de ĉiuj. Kaj lin forlasis lia forto; tiu sento de edzo, kiu simple deziras esti respektata, invadis lin de tia konfuzo, kian li neniam spertis, eĉ ludante la plej hazardajn kartojn kiam li ekriĉiĝis.

Eniris Flavia, kiu daŭre surhavis siajn urbajn vestojn, demetinte nur

siajn ĉapelon kaj gantojn.

Nantas, kies voĉo tremetis, diris, ke li mem vizitus ŝin, se ŝi sciigus pri sia reveno.

Sed, sen sidiĝi, kun la sinteno de senpacienca klientino, ŝi faris geston por instigi lin rapidi.

"Sinjorino" li komencis, "klarigo fariĝis necesa inter ni... Kien vi iris ĉi-matene? "

La tremanta voĉo de ŝia edzo, la krudeco de lia demando treege surprizis ŝin.

Kun malvarma tono ŝi respondis : "Nu, mi iris kien plaĉis al mi !"

"Precize, ekde hodiaŭ tio ne povos konveni al mi!" li paliĝante rediris. "Memoru, kion mi diris al vi. Mi ne konsentos, ke vi uzu la liberecon, kiun mi lasas al vi, tiel ke vi senhonorigas mian nomon."

Flavia ridetis kun suverena malestimo.

"Senhorigi vian nomon, sinjoro!... sed tio koncernas vin, kaj jam ne plu estas farendaĵo."

Tiam kun freneza kolerego Nantas antaŭeniris kvazaŭ li volus bati ŝin, kaj balbutis:

"Kompatindulino! Vi ĵus eliris el la brakoj de sinjoro De Fondettes. Vi havas amanton! Tion mi scias..."

"Vi eraras!" ŝi respondis sen retroiri fronte al la minaco. "Mi neniam revidis sinjoron De Fondettes. Kaj eĉ se mi havus amanton, vi ne povus riproĉi tion al mi. Ĉu tio gravas por vi?... Nu, vi forgesas niajn aranĝojn!"

Dum momento, li rigardis ŝin per konfuzitaj okuloj.

Poste, plorsingultante, kriante kun longe retenita pasio, li ĵetis sin al ŝiaj piedoj.

"Ho! Flavia! Mi amas vin!"

Tute rekte starante, ŝi forŝoviĝis ĉar li tuŝis la angulon de ŝia robo. Sed la malfeliĉulo sekvis ŝin, surgenuigante sin, kun etenditaj manoj.

"Mi amas vin, Flavia!... Vin mi amas kiel frenezulo!... Kiel tio okazis, tion mi ne scias... jam de pluraj jaroj... Kaj iom post iom, tio invadis min tute... Ho! Mi luktis! Mi opiniis tiun pasion ne inda je mi

: mi memoris pri nia unua interparolo... Sed hodiaŭ mi tro suferas;
mi bezonas paroli al vi."

Li longe daŭrigis.
Ĉiuj liaj kredoj kolapsis.

Tiu viro, kiu plene fidis la potencon kaj asertis, ke la volo estas la nura stango por levi la mondon, falis neniigita, malforta kiel infano kaj senarmigita antaŭ virino.

Kaj malgraŭ la realiĝo de revo pri havaĵo kaj la konkero de alta situacio, li estus ĉion doninta, por ke tiu virino lin relevus per kiso sur lia frunto.

Ŝi fuŝis lian triumfon.

Li ne plu aŭdis la ormonerojn, kiuj sonis en liaj oficejoj; li ne plu sonĝis pri la atendovico de la korteganoj, kiuj ĵus salutis lin.

Li forgesis, ke la imperiestro eble vokos lin al potenco.

Tiuj aferoj ne ekzistis.

Ĉion li havis, sed nur Flavian li volis.

Se Flavia malkonsentos, nenion li havos.

8.

"Aŭskultu!" li daŭrigis, "kion mi faris, tion mi faris por vi. Estas vere, ke en la komenco vi ne gravis : mi laboris por kontentigi mian orgojlon. Sed poste vi fariĝis la nura celo de ĉiuj miaj pensoj, de ĉiuj miaj klopodoj. Mi diris al mi, ke mi devas supreniri kiel eble plej alte por vin meriti. Mi esperis cediĝi vin, kiam mi metos mian potencon je viaj piedoj... Vidu mian hodiaŭan situacion. Ĉu mi ne gajnis vian pardonon?... Ne malestimu min, mi petegas..."

Ŝi ankoraŭ ne parolis. Ŝi kviete diris:
"Restariĝu, sinjoro! Iu povus eniri!"

Li rifuzis kaj refoje petegis ŝin. Eble li plu atendus, se li ne estus ĵaluza pri sinjoro De Fondettes. Lin panikis tiu turmento.

Poste, li montris sin tre humila :
"Mi ja vidas, ke vi daŭre malestimas min. Nu! atendu : ne donacu vian amon al iu ajn. Mi promesas al vi aferojn tiom grandajn, ke mi ja scios cediĝi vin... Bonvolu pardoni, se antaŭ momento mi estis kruda. Mi perdis mian memregon... Ho! Lasu min esperi, ke iam vi amos min!"

"Neniam!" ŝi vigle respondis.

Ĉar li restis sur la planko, ege turmentita, ŝi intencis eliri.
Sed, perdante la kapon, li kolerege staris kaj ekprenis ŝiajn manartikojn.

Ĉu virino lin tiele spitus, dum la tuta mondo kuŝas je lia piedo?
Ĉion li povis fari : ŝanceligi ŝtatojn, laŭvole regi Francion... kaj li ne povus ricevi amon de sia edzino!
Li, tiom forta, tiom potenca, kies plej etaj deziroj estis ordonoj!...
Ĉu lia nura deziro neniam plenumiĝos, ĉar tion rifuzas estaĵo malforta kiel infano?

Li premis ŝiajn brakojn kaj rediris per raŭka voĉo:

"Mi volas... Mi volas..."

"Kaj mi ne volas!" respondis Flavia, pala, kiu tute rigidiĝis de sia volo.

Ilia lukto daŭris, kiam la barono Danvilliers malfermis la pordon. Vidante lin, Nantas ellasis Flavian kaj ekkriis:

"Sinjoro, jen via filino, kiu ĵus revenis de sia amanto... Nu, diru al ŝi, ke edzino devas respekti la nomon de sia edzo, eĉ kiam ŝi ne amas lin, kaj ne plu haltigas ŝin la penso pri sia propra honoro."

La barono, tre maljuniĝinta, daŭre staris sur la sojlo, antaŭ tiu perforta sceno. Tio estis por li doloriga surprizo. Li kredis, ke la paro estis unuiĝinta ; li aprobis la ceremoniajn rilatojn de la geedzoj, opiniante, ke temas nur pri konveneca sinteno.

Lia bofilo kaj li apartenis al du malsamaj generacioj. Sed, se lin ĉagrenis la maldelikata agado de la financisto, se li malaprobis kelkajn projektojn, kiujn li mem taksis destinitaj por fiaski, li tamen devis agnoski la forton de lia volo kaj lian viglan inteligentecon. Kaj subite li falis en tiun dramon, kiun li ne suspektis.

Kiam Nantas kulpigis Flavian, ke ŝi havas amanton, la barono, kiu ankoraŭ traktis sian edziĝintan filinon tiel severe kvazaŭ ŝi estus dekjaraĝa, antaŭeniris per sia paŝo de solena maljunulo.

"Mi ĵuras al vi, ke ŝi ĵus revenis de sia amanto!" rediris Nantas, "kaj vidu : ŝi staras tie kaj defias min!"

Flavia malestime turnis la kapon. Ŝi aranĝis siajn manumojn, kiujn la perforto de ŝia edzo estis ĉifinta. Ŝia vizaĝo tute ne ruĝiĝis. Tamen ŝia patro parolis al ŝi.

"Filino mia, kial vi ne defendas vin? Ĉu via edzo diras la veron? Ĉu vi rezervus tiun lastan ĉagrenon por mia maljuneco?... Estus la ofendo ankaŭ por mi; ĉar en unu familio la peko de unu nura membro malpurigus ĉiujn la aliajn."

Tiam ŝi faris senpaciencan movon. Ŝia patro elektis la taŭgan momenton por akuzi ŝin! Dum momento, ŝi plu eltenis tiun pridemandadon por ne trudi al li la honton de klarigo. Sed, ĉar siavice li koleriĝis vidante ŝin silenta kaj provoka, ŝi finfine diris:

"Nu, patro mia! Lasu do tiun viron ludi sian rolon! Vi ne konas lin! Por via respekto, ne trudu al mi, ke mi parolu!"

"Li estas via edzo!" plu diris la maljunulo. "Li estas la patro de via infano!"

Flavia elrektiĝis, tremetante.

"Ne, ne, li ne estas la patro de mia infano. Finfine, mi ĉion diru... Tiu viro estas eĉ ne deloganto, ĉar almenaŭ lin senkulpigis, se li estus min amanta. Tiu viro simple vendis sin kaj konsentis maski la pekon de aliulo."

La barono turnis sin al Nantas, kiu, palega, retroiris.

"Ĉu vi aŭdas, patro mia?" plu diris Flavia kun plia forto. "Li vendis sin kontraŭ mono!... Mi neniam amis lin; li neniam tuŝis min per siaj fingropintoj... Mi volis eviti al vi grandan doloron: mi aĉetis lin, por ke li mensogu al vi... Rigardu lin! Vidu ĉu mi diras la veron!"

Nantas kaŝis sian vizaĝon inter la manoj. "Kaj hodiaŭ" daŭrigis la juna virino, "li ja volas, ke mi amu lin!... Li surgenuiĝis kaj ploris. Verŝajne temas pri ia komedio. Pardonu, ke mi trompis vin, patro mia. Sed ĉu mi vere apartenas al tiu viro?... Nun, vi scias ĉion; ni eliru. Li ĵus perforte kondukis kun mi; ne pli longe mi restos ĉi tie."

La barono rektigis sian kurban talion. Kaj li silente iris preni la brakon de sia filino. Ili ambaŭ trairis la ĉambron, kaj Nantas faris neniun geston por reteni ilin. Kaj ĉe la pordo la maljunulo nur diris: "Adiaŭ, sinjoro."

La pordo refermiĝis.

Nantas restis sola, konsternita; li freneze rigardis la nenion ĉirkaŭ si.

Ĉar Ĝermano ĵus eniris kaj metis leteron sur la skribtablon, li nekonscie ĝin malfermis kaj tralegis. Tiu letero, tute skribita per la mano de l' imperiestro, vokis lin kiel ministro pri financoj, kun tre afablaj vortoj.

Li apenaŭ komprenis. La atingo de ĉiuj liaj ambicioj ne tuŝis lin.

En la apudaj kaso, plilaŭtiĝis la sono de l' oro : tio estis la momento, kiam la "firmao" Nantas bruis kaj pelis ĉiujn al agado.

Kaj meze de tiu giganta afero, kiu estis lia laboro, ĉe la kulmino de lia potenco, stulte kaj fikse rigardante la skribon de l' imperiestro, li eligis tiun infanan ĝemon, kiu estis la neado de lia tuta vivo:

"Mi ne estas feliĉa... Mi ne estas feliĉa..."

Li ploris kun la kapo sur la skribtablo, kaj liaj varmaj larmoj viŝis la leteron, kiu nomis lin ministro.

FINO